

## LA PENSOJ DE COMENIUS PRI UNIVERSALA LINGVO

de D-ro Kamil ŠKODA, faka asistento de la universitato en Praha.  
El la ĉeĥa tradukis kaj per rimarkoj provizis Jan RATHAY

Rimarko de la esperantiginto: La granda ĉeĥa pensulo kaj pedagogo Jan Amos Komenský (latine Comenius<sup>1)</sup>) naskiĝis en la jaro 1592 en la suda Moravio (meza parto de la hodiaŭa Ĉeĥoslovakio). Post siaj studoj hejm- kaj eksterlande (Přerov, Herborn, Heidelberg) li fariĝis hejme instruisto kaj pastro de la Unuiĝo de Bohemaj Fratoj (*Unitas fratrum*). Post la batalo sur la Blanka Monto apud Praha (1620), en kiu estis venkita la bohema protestantismo, Comenius devis kun multaj miloj da samkonfesiuloj forlasi sian patrujon (1628). Kiel ekzilito li vivis poste kaj funkciis en diversaj lokoj en Pollando, Anglujo, Svedujo, Hungario kaj fine en Nederlando, kie li mortis en Amsterdam en la jaro 1670.

Comenius estas antaŭ ĉio konata kiel granda pedagogo, kiu reformis la lernejon kaj la instru-metodojn teorie kaj praktike, kaj sur kies principoj ankoraŭ nun staras la moderna lernejsistemo kaj pedagogio. Liaj pedagogiaj verkoj estis la unuan fojon enkolekte eldonitaj en Amsterdam en la jaro 1657 sub la titolo „*Opera didactica omnia*” (Ĉiuj didaktikaj verkoj).

Sed Comenius estis ankaŭ pensulo, kiu klopodis pri la reformo de la tuta homa socio surbaze de morala kaj racia edukado de la homoj. Ĉi tien apartenas precipe lia ampleksa verko „*De emendatione rerum humanarum consultatio catholica*” (Ĝenerala konsulto pri la rebonigo de homaj aferoj), kies kvina parto, titolita *Panglottia*, estas dediĉita al la demando de la universala lingvo.

La originaloj de la menciitaj verkoj estas skribitaj latinlingve.

### I. El la historio de la plej malnovaj provoj pri artefarita lingvo

En la historio de la homaro ni renkontas pli ol unufoje provon krei komunan lingvon, ĉar la diverseco de lingvoj kaŭzis kompreneble ĉiam multe da malhelpoj en la rilatoj inter la homoj.

En multaj okazoj evoluis por la interkompreniĝado diversaj komunaj signoj, kiel ekz. en la matematiko, muziko, ĥemio, k.s.

Ne estas mirige, ke ekestis la ideo uzi la ciferojn ankaŭ por pli granda sfero de interkompreniĝado ol nur por la sfero de nombroj. El tia fundamento eliras en sia sistemo Athanasius Kircher en la libro „*Polygraphia nova et universalis*” (Nova kaj universala poligrafio<sup>2)</sup>,

<sup>1)</sup> legu Komenský kun akcento sur la dua silabo.

<sup>2)</sup> = pluresprima aŭ plursignifa skribo.

Romo, 1663. En lia sistemo la vortoj estas ordigitaj laŭ gramatikaj specoj en tabeloj, kiuj estas signitaj per romaj ciferoj, kaj en ĉi tiuj tabeloj ĉiu vorto havas sian signon en arabaj ciferoj. Apartaj signoj ekzistas ankoraŭ por reciprokaj rilatoj esprimataj per la deklinacio, konjugacio, k.s. Kiel videblas, iom malsimpla esprimo per ĉi tiu maniero kaŭzus en la praktiko grandajn malfacilaĵojn.

Unu el tiuj, kiuj provis la kreon de artefarita lingvo, estas Georgo Dalgarno, kiu en la subtitolo de sia libro „*Ars signorum, vulgo Character universalis et lingua philosophica*” (Arto de signoj aŭ universala skribo kaj filozofia lingvo), Londono, 1661, skribas pri la senco de ĉi tiu filozofia lingvo: „..... per kiu la homoj de plej diversaj lingvoj povos post nuraj dekkvar tagoj ĉiujn siajn pensojn (en ordinaraj aferoj) reciproke al si sciigi, ĉu skribe, ĉu parole, ne malpli kompreneble ol per siaj propraj hejmaj lingvoj. Krome la junuloj povos ĉi tie ĉerpi ankaŭ la fundamentojn de la filozofio kaj veran aplikadon de la logiko multe pli rapide kaj facile ol el la kutimaj filozofiaj libroj.”

Dalgarno, kiu disdividis ĉiujn nociojn en deksep klasojn ĝis grandaj detaloj, kreis sistemon tiel malfacilan, ke lia aserto pri la alproprigo de ĉi tiu sistemo en dekkvar tagoj estas unuavide ege troigita.

Eĉ tiel eminentaj filozofoj, kiaj estis Bacon de Verulam (1561-1626) kaj Descartes (1596-1650), interesiĝis pri artefarita lingvo kaj esprimis pri ĉi tiu problemo rimarkindajn pensojn.

La samtempulo de Descartes kaj Comenius, Mersenne, elstara matematikisto kaj filozofo, kiu kun ambaŭ estis en rilatoj, klopodis en sia korespondado kiel eble plej profunde ekinteresiĝi ambaŭ pensulojn pri kreo de artefarita lingvo.

Comenius okupiĝis pri ĉi tiu ideo tre serioze. En la verko „*Via lucis*” (Vojo al la lumo), skribita dum la restado en Anglujo (1641 kaj 1642), li faras mencion pri universala lingvo kaj pri ties neceso por la disvastigado de la ĝenerala lumo.

Jam en ĉi tiu verko oni renkontas multajn pensojn kiujn Comenius poste ree kaj pli detale pritraktas kaj kompletigas en sia „*Panglottia*” (Universala lingvo). Li montras du manierojn, kiel krei la novan lingvon: aŭ sub gvido de la lingvoj jam konataj, aŭ sub gvido de la aferoj mem.

Ankaŭ en la „Vojo al la lumo” Comenius postulas, ke inter la instruituloj restu konservitaj la hebrea, greka kaj latina lingvoj kaj ke la nacioj konservu al si kaj kulturu ankaŭ siajn proprajn lingvojn, estu la komuna lingvo kiu ajn.

La *Panglotio* formas parton de la ampleksa verko de Comenius „Ĝenerala konsulto pri la rebonigo de homaj aferoj”, kiu havas entute sep partojn kaj rilate sian amplekson estas nur je unu kvarono malpli granda ol la fama kolekto de lia pedagogia verkaro „Ĉiuj didaktikaj

verkoj". Nur la unuaj du volumoj de la „Ĝenerala konsulto” estis eldonitaj dum la vivo de Comenius, la ceteraj kvin falis en forgeson kaj pli poste oni opiniis ilin perditaj; nur antaŭ la dua mondmilito malkovris ilin en Halle an der Saale profesoro Dimitrij Ĉiĵevskij. La elstara ĉeĥa komeniologo univ. prof. D-ro Josef Hendrich tradukis el la trovitaj partoj tri en la ĉeĥan lingvon, el kiuj du estis la unuan fojon libre publikigitaj sub la titolo „Pampaedia” (Universala edukado) kaj „Panorthosia” (Universala reformo). La traduko de la *Panglotio* restis bedaŭrinde en manuskripto, tiel ke ĉi tiu parto ne povis ĝis nun koniĝi en pli vastaj rondoj de interesitoj.

Kiel bazo por ĉi tiu studo povis esti uzata, pro la afableco de la heredintoj de Hendrich, la ĉeĥa traduko de la *Panglotio*. Hendrich prespretigis sian tradukon kaj provizis ĝin per enkonduko kaj riĉaj rimarkoj. Ĉar, kiel dirite, la *Panglotio* ĝis nun ne estis libre publikigita, ne estas eble ĉe la citaĵoj indiki la respektivajn paĝojn.<sup>3)</sup>

La „Ĝenerala konsulto” de Comenius estis naskiĝanta en la maltrankvilaj tempoj fine de la tridekjara milito kaj en sia koncepto estis preta jam ekde la tempo de la agado de Comenius en Svedujo (1642-1648). Comenius laboris super tiu granda verko ankaŭ en la lastaj jaroj de sia vivo dum la restado en Amsterdam, kie tamen la tiama nederlanda medio estis por li neniel trankvila atmosfero. Ĉi tien sin retiras elmigrintoj de diversaj konvinkoj el diversaj landoj. Ĉi tie kruciĝas kaj interbatalas la ortodoksa religio kun la racionalismo, kiu iras ĝis panteismo kaj ateismo. Ĉi tie estas kampo por mistiko kaj disvastigado de diversaj profetaĵoj. Ne estas do mirige, ke en tia medio Comenius travivas grandajn internajn konfliktojn. Li perdas multe da tempo kaj energio per multaj polemikaj teologiaj traktaĵoj, en kiuj li sin defendas kontraŭ diversaj akuzoj kaj alfrontas ĉiujn atakojn kontraŭ li faratajn, kiuj tiom maldolĉigis al li la lastajn jarojn.

Estis vivtragedio de Comenius, ke li ne sukcesis jam fintekstigi la „Ĝeneralan Konsulton”, ke ĝi por longa tempo restis forgesita, tiel ke multajn ĝiajn grandajn pensojn — inter ili ankaŭ la ideojn de Comenius pri universala lingvo — ni ekkonas nur nun.

## II. La „Panglotio” de Comenius

Comenius jam per la titolo de la kvina parto de la „Ĝenerala konsulto pri la rebonigo de homaj aferoj” montras, kion li en ĉi tiu verko pritraktas. La tuta titolo estas: „*Panglotio, en kiu estas pripensata la*

<sup>3)</sup> La esperantiginto komparis la tekston de la subaj sekcioj II kaj III kun la latina originalo de la verko de Comenius, al kiu li konformigis sian tradukon. La originalon al li afable disponigis la Universitata Biblioteko en Praha, la Ŝtata Pedagogia Biblioteko de Comenius en Praha kaj la Ĉeĥoslovaka Akademio de Sciencoj.

malfermo de universalaj rilatoj inter la nacioj pere de saĝa kulturado de lingvoj kaj kie prezentigas specimenoj de afero tiel grava, promesplene komencita, al pluaj provoj.” Al ĉi tiu verko estas ankoraŭ almetita la aldono „*Novae harmonicae linguae tentamen primum*” (Unua provo pri nova harmonia lingvo).

En la enkonduko Comenius diras, ke estas necese pripensi, „..... ĉu oni povus trovi efikan planon, 1. kiel elfajli la lingvojn de ĉiuj nacioj ĉiun aparte tiel, ke ĉiuj estu kapablaj por libroj destinitaj al la klerigado de la homoj; 2. aŭ kiel atingi, ke ĉiuj nacioj povu per ia facilega maniero lerni la lingvojn de pli klerigitaj nacioj, en kiuj estos skribitaj la menciitaj libroj (funeloj de la saĝeco), kaj ke tiel la najbaraj nacioj partoprenu ankaŭ en ilia klero; 3. aŭ fine ĉu oni povus prefere fondi ian lingvon komunan al ĉiuj loĝantoj de la tero.”

Kiel kutime ankaŭ en ĉi tiu verko Comenius publikigas sinoptikan tabelon de la tuta laboraĵo, kiu estas dividita en dek ĉapitrojn. La tabelo aspektas jene:

La Panglotio montras	3. Kiamaniere?	pli speciale, per la kulturado de	ĝenerale, per trovo de la ideo de perfekta lingvo ..... ĉap. III.
			ĉiuj lingvoj, <i>pantoglottia</i> (ĉiulingveco) ĉap. IV.
			ĉefaj lingvoj, <i>polyglottia</i> (plurlingveco) ĉap. V.
			unu lingvo, <i>monoglottia</i> (unulingveco), kies pruviĝas <i>neceso</i> ..... ĉap. VI. <i>eblo</i> ..... ĉap. VII. <i>facileco</i> ... ĉap. VIII.
			plene; pri la kunligo de tiu trispeca vojo ..... ĉap. IX.
			4. <i>Konkludo</i> , kiu entenas la triumfon de la homa gento super la venko de la lingva barbareco kaj suspirojn al Dio Sankta Spirito ..... ĉap. X.

Ni atentu kelkajn ĉefajn ideojn, kiujn Comenius prezentas en sia *Panglotio*.

Tuj en la unua ĉapitro li traktas pri tio, kiel la senfina malsameco kaj konfuzo de la lingvoj estas kruela obstaklo de la universalaj rilatoj inter la nacioj kaj kiel estas dezirinde forigi tiun obstaklon, ĉar „... sekve de ĉi tiu diverĝinteco de lingvoj la homoj komencis deturniĝi de si reciproke, disiĝi en la opinioj, disputi pri la limoj, sin trafi reciproke per militoj kaj sin pereigi per reciprokaj katastrofoj ...”. Ĉi tiu obstaklo estas forigebla tiel, ke oni inventos novan, komunan lingvon.

Laŭ Comenius la lingvo estas „..... sistemo de vortoj, kiuj signas aferojn, prezentas ilin al la mensoj kaj estas kunligitaj laŭ preciza ordo.” ..... „Se oni komprenas la aferojn tiel, kiel ili estas, kaj se oni ilin esprimas tiel, kiel oni ilin komprenas, ekestas harmonio de la aferoj kun la mensoj kaj harmonio de la mensoj kun la buŝo”.

Comenius dividas la lingvojn en *krudajn*, kiujn parolas nacioj barbaraj, lingvojn *kulturitajn*, kiujn havas nacioj klerigitaj, kaj fine estas lingvo *perfekta*, kiun tamen estas necese nur en estonto konstrui. La perfekta lingvo estas esperebla nur de la pansofio kaj universala edukado <sup>4)</sup> per tio, ke oni kreos *universalan vortaron, universalan grammatikon* kaj fine kiel eble *plej plenan enciklopedion*.

En memstaraj ĉapitroj ni legas pri la „*Pantoglottia*” (ĉiulingveco), „*Polyglottia*” (plurlingveco) kaj pluraj ĉapitroj estas dediĉitaj al la „*Monoglottia*” (unulingveco). Tio estas la tri vojoj, kiuj povas konduki al la forigo de la lingva konfuzo.

Sub *pantoglotio* Comenius komprenas „..... tian elfajladon de ĉiuj lingvoj uzataj de ĉiuj aĵn nacioj, ke ĉiu el ili fariĝu kapabla por ĉiuj libroj universaledukaj.”

Pli avantaĝa estas la *poliglotio*, sub kiu estas komprenenda trispeca afero: Unue, ke la nacioj malpli progresintaj ellernu la lingvon de iu pli klerigita najbara nacio, kaj ke ili samtempe kun ĝi kaj pere de ĝi akiru la kleron kaj saĝon. Due, ke ĉi tiujn lingvojn oni povu facile lerni kaj ke oni aparte zorgu pri la alproprigo de la hebrea, greka kaj latina lingvoj. Trie, ke oni starigu por ĉiu kontinento unu lingvon komuna, tiel ke kiu ellernos la kvar fundamentajn lingvojn de la kvar kontinentoj (Australio ne estis konata), povos vojaĝi tra la tuta mondo.

Plej vaste traktas Comenius pri la *monoglotio* kaj dediĉas apartajn ĉapitrojn por pruvi ĝian necesecon, eblon kaj facilecon.

Li atentigas pri tio, kial neniu el la ĝistiamaj lingvoj povas esti akceptita kiel komuna, nome antaŭ ĉio tial, ke neniu el ili „..... plenumas ĉiujn kondiĉojn, kiujn ..... postulas perfekta lingvo”. La liatempaj

<sup>4)</sup> Pansofio (el la greka „*pan*” ĉiu, ĉio, kaj „*sofia*” saĝo, do universala saĝo) signas kunigon de ĉiuj homaj scioj sur universala fundamento. Por Comenius celo de la pansofio estas la penado al la Dia regno, kaj ĝia tasko: ordigi la aferojn de la homa socio sur bazo de la saĝo kaj racio. Al tio devas servi ankaŭ la universala edukado, kies fina celo por Comenius estas la elformado de la homo laŭ Dia bildo.

lingvoj havas senfine multe da mankoj, ne esprimas precize la aferojn, en ili svarmas malregulaĵoj, kaj tial ili estas ankaŭ malfacilaj.

Comenius prezentas diversajn kialojn favore al la nova lingvo, kiu devas „ja esti riĉa kaj plena ....., sed samtempe konciza ....., ĉar „..... konciza kaj kerneca parolo estas vojo de la saĝeco”, kaj samtempe citas eblajn nomojn de la nova lingvo. Ekzemple oni povus ĝin nomi racia, analogia, harmonia, natura, mistika, filozofia, pansofia, k.s.

Laŭ Comenius la koncizo de la nova lingvo estas akirebla vortare, grammatike kaj ortografie. Li prezentas diversajn proponojn kaj sugestojn al la efektivigo de la nova lingvo kaj multajn el ĉi tiuj pensoj li ripetas aŭ plidetaligas kaj alivariantigas en la almetita „*Provo pri nova harmonia lingvo*”.

Comenius venas eĉ kun la ideo, ke la nova lingvo devas esti konciza ne nur en la vortoj kaj en la sono, sed ankaŭ en la skribo, „..... kaj tio ĝis tia grado, ke en la rapideco egalulo la mano la buŝon (tio estas la skribo la parolon), kaj ke tiu, kiu aŭskultas, povu kapti ĉion ne nur per la orelo, sed (se li volos) ankaŭ per la mano.” Kaj al tio li ankoraŭ aldonas: „Fine estos utile eĉ librojn tiel presi, ke ĉiu povu porti kun si tutan bibliotekon.”

Bela estas la penso de Comenius, ke „..... ĉiuj lingvoj havas siajn florojn; se ni ilin kolektos, estos eble krei el ĉiuj ion novan, plej bonan.”

Por la nova lingvo Comenius starigas jenajn plej altajn leĝojn:

„1. Kiom da aferoj, tiom da vortoj, nek pli nek malpli, kaj ĉiu nova afero havu novan vorton.

2. Diferenco en la afero havu diferencon en la vorto. Do neniu vorto estu ambaŭgenraj aŭ „epicenaj” <sup>5)</sup>.

3. Simpla afero, simpla vorto; kunmetita afero, kunmetita vorto; kiomfoje, tiomfoje.

4. Substanca afero donu al la vorto la karakteron de substanceco, akcidenta la karakteron de akcidenteco, manka la karakteron de manko.

5. Diferenca kazo de la sama nomo aŭ diferenca formo de la sama verbo havu diferencon finaĵon, por ke nenio koincidu kun la alia aŭ kaŭzu konfuzon en la kunteksto.

Principo: *Kio aĵn havas alian signifon, havu alian formon.*”

La fermparto de la *Panglotio* de Comenius enhavas triumfon de la homa gento super la barbareco de lingvoj. Comenius kredas, ke post la venko super la lingvaj konfuzoj „..... malfermiĝos universala interkomunikado inter la nacioj, ĉiuflanke libera, senbara kaj ĉarma, kiam ni ĉiuj povos esti de ĉiuj komprenataj.”

<sup>5)</sup> *Epicoenum* (grek.-lat.) estas nomata la substantivo, kies grammatika genro havas neniun rilaton al la natura sekso, kaj kiu do povas esti uzata kaj por viraj kaj por inaj estuloj, ekz. homo, persono, fiŝo, birdo, ktp.

### III. La provo de Comenius pri universala lingvo

En la enkonduko al la „*Unua provo pri nova harmonia lingvo*” Comenius diras, ke al li temas krei „..... aferecan lingvon, peranton de afereca saĝo; estos necese preni kiel idealon jam ne la antaŭajn lingvojn, sed la aferojn mem”. Li deklaras solene, „..... ke antaŭ kompleta kaj perfekta sistemigo de la aferoj kaj sen kvazaŭ universala konsento de saĝaj homoj ne estos eble provi plenan elkonstruon de ĉi tiu lingvo (*des malpli ties uzadon*)”. Li stariĝas kontraŭ la kreado de pluraj novaj lingvoj, ĉar per tio oni ne forigos la haoson, male oni ĝin ankoraŭ obligos. Simile ankaŭ la alifarado kaj fajlado de malnovaj, uzataj lingvoj postulos pli da laboro kaj peno ol kreo de nova lingvo, senkonsidere ke „..... la malnova restas malnova, oni ĝin alifaradu kiel ajn, kaj la kunflikajo restas kunflikajo; kontraŭe la nova vesto estas nova kaj povas alporti pli da belo kaj utilo ol ĉiuj eluzitaj.”

Comenius dividas sian provon en tri partojn:

1. materienhava parto de la nova lingvo, *la vortaro*;
2. formala parto, *la gramatiko*;
3. praktika parto aŭ pripensado pri la fondo de jam plena *terminaro*.

1. En la **unua parto** Comenius pritraktas la vortan materialon, la literojn, silabojn kaj vortojn.

Laŭ Comenius la vortaro de la nova lingvo devas esti pli malgranda ol la aliaj, tamen ĉe tio pli perfekta kaj pli riĉa. La vortoj estas kreitaj por esprimi la materiajn aferojn. Kiom oni ilin uzas por esprimi aferojn spiritajn, oni tion faras helpe de analogio, kaj ĝuste la priatentado de la analogio estos fundamento por krei veran vortaron de la nova lingvo.

En la nova vortaro devas havi precizan signifon jam la literoj kaj la silaboj de ĉiuj specoj kaj kompreneble la vortoj, ĉe kio ĉiu vorto havos efektive validon de plena difino.

Plue sekvos la *vortaro frazeologia*, kiu klarigos la kunligaĵojn de la vortoj laŭ la kombinado de la aferoj, kaj la *vortaro tropologia*, kiu eksplikos la metaforan signifon ĉe la vortoj kaj parolturnoj (sentencoj).

La materialon de la nova lingvo formos do la literoj, silaboj kaj vortoj, ĉe kio validos plej alta leĝo, ke ĉiu elemento per si mem estu signifoporta.

**Literoj.** La ordinara lingvoj havas malsaman nombron da literoj, ekzemple la itala dudek — ĝi ellasas pli raspajn sonojn — dum la abisena alfabeto havas 47 literojn. En multaj lingvoj kelkaj literoj diferencas per la skriba formo, sed ne en la prononco per la sono; en tia kazo estas do senbezona abundo da literoj.

En la nova lingvo oni enkonduku nur tiom da literoj, „..... kiom estas necese por esprimi ĉiujn diferencaĵojn de la aferoj kaj kiom oni povas precize formi per la homa lango .....”.

Al nia buŝo estas donitaj tridek ses simplaj, individuaj sonoj, nome krom kvin vokaloj (i, e, a, o, u) *kvin specoj de konsonantoj*:

1. kvin gorgaj: h, ĥ (en la originalo skribata ch), k, g, j;
2. kvin dentaj: d, t, z, s, c;
3. kvar lipaj: b, p, f, w (en la latina lingvo v);
4. du langaj: l, r;
5. du nazaj: m, n;

La menciitajn konsonantojn, escepte de la gorgaj, oni povas ankoraŭ „moligi”<sup>5a)</sup> kaj tiel oni ricevas pluajn dektri sonojn.

Comenius plue pritraktas la sinsekvon de la literoj kaj ties signojn, kiuj „..... povas konsisti el nuraj punktoj, strekoj kaj liniofiguroj, sed diverse kunfiguritaj.” Li almetas tabelon, en kiu li montras, kiel li imagas tian skribon, kaj faras rimarkojn pri la afereca signifo de la literoj.

Ekzemple A signifos ion vastan kaj grandan, I ion malgrandan kaj malfortikan, L signifos molaĵon, R malmolaĵon, ktp.

**Silaboj.** La silabo estas artikigita voĉsono elparolata per unu malfermo de la buŝo. Kvankam en neniuj lingvoj la nombro de la silaboj kutimas esti difinita, estas laŭ Comenius eble ĝin fiksi en la nova lingvo, supoze de certa nombro da konsonantoj kaj vokaloj kaj ĉe akceptita principo, ke neniuj silabo havu pli ol kvin konsonantojn. Comenius opinias, ke al la kreo de la fundamentaj vortoj de la tuta lingvo — ĉiuj unusilabaj — sufiĉos iom pli ol 5000 silaboj de unu, du, tri, kvar literoj. Oni ne evitu eĉ la plej raspajn silabojn, ĉar ili bone servas por esprimi raspajn aferojn, kaj la sono devas redoni la aferon tia, kia ĝi estas.

**Vortoj.** En la nova lingvo oni kreu tiom da vortoj, kiom da aferoj estas — nek pli, nek malpli. Per tio oni evitos homonimojn kaj sinonimojn kaj tiel ankaŭ la danĝeron de taŭtologio.

„Ĉiu vorto estu per siaj kvanteco kaj kvalito precize akomodita al tiu afero, kiun ĝi devas signifi, ĝis tiu grado, ke estu neeble doni ĝin erare al alia afero.”

Ĉe tio „..... la simila estu esprimata per simila, la mala per mala, la simpla per simpla, la kunmetita per kunmetita, la mallonga per mallonga kaj la longa per longa, la rapida per rapida kaj la malrapida per malrapida, la malmola per malmola kaj la mola per mola, tute laŭ la normoj de la aferoj mem.”

La nomoj de aferoj, kiuj diferencas nur per la sekso, diferencu nur per la gramatika finaĵo distingiganta la sekson.

„Estu neniuj radikoj, de kiu oni ne povus formi substantivojn kaj adjektivojn, verbojn kaj adverbojn; tiel la lingvo estos tre fekunda, riĉe

<sup>5a)</sup> Siblaj konsonantoj moligitaj estas: ĵ, ŝ, ĉ; la aliajn oni moligas per *j*, do: *dj, tj, bj, pj*, ktp., ĉe kio, tamen, ambaŭ konsonantoj estas elparolataj kvazaŭ ili kune estus unu sola konsonanto. En la slavaj lingvoj tia „moligo” estas tre konata fenomeno.

kapabla por esprimi ĉion, kaj samtempe tre facila, ĉar tutplene analoga.”

„Plej alte superordigita speco de verboj estu la netransitiva aŭ subjekta *sum*, la aktiva *facio* kaj la pasiva *fio* <sup>6)</sup>. Ĉio ĉi esprimita per unu silabo. Ĉar tiu silabo, alligita (kiel finaĵo donita) al ĉiu ajn afero, esprimos ĝian 1. staton, 2. movon, 3. ŝanĝigon.”

2. En la **dua parto** Comenius traktas pri la gramatiko, en kiun li enkalkulas:

- a) literojn (alfabeton),
- b) silabojn,
- c) vortojn (substantivoj, adjektivoj, pronomoj, verboj, adverboj, participoj, prepozicioj, konjunkcioj, interjekcioj),
- d) parolturnojn,
- e) frazojn,
- f) frazperiodojn.

En la Provo, kiu estas nekompleta, Comenius ne pritraktas ĉiujn ĉi partojn nek ilin sisteme dismembrigas.

**Literoj.** Comenius ĉi tie atentigas pri tio, ke estas necese difini la nombron de la literoj, iliajn nomojn, naturan ordon de la alfabeto, konvenajn signojn, la signifon de la literoj per si mem, la signifon de la literoj ĉe la konstruado de vortoj.

Pri la nombro de la literoj kaj ties nomoj Comenius parolis jam en la unua parto, ĉi tie li plidetaligas kelkajn aferojn. Li diras, ke simile kiel en la silabo estas unuopaj, duopaj kaj triopaj konsonantoj, oni apliku krom unuopaj vokaloj ankaŭ vokalojn duopajn (diftongojn) kaj triopajn, por esprimi aferojn kunmetitajn kaj malsimplajn. Al ĉiu sono estu atribuita propra skriba signo, kiun oni neniam misinterŝanĝu.

Li montras, kiel aspektu la alfabeto sinsekvo de la literoj. La alfabeto de la nova lingvo havas en la komenco la vokalojn, kaj la konsonantoj havas naturan vicordon. Unue iras la guturaloj, ĉar ili naskiĝas plej malalte en la gorgo. En la fino estas la nazaloj, elspirnaskataj en la nazo. Inter ili estas la ceteraj konsonantspecoj. La alfabeto aspektas do jene:

I E A O U; H CH (Ĥ) G K J; L R; Z S C T D; B P V (aŭ W) F; M N.

Simpla sono havu ankaŭ simplan signon, unu streketon tiel aŭ alie torditan. Sonoj de la sama naskiĝloko, similaj kaj najbaraj, havu ankaŭ literojn similtrajtajn.

„Tamen ĉiuj ĉi signoj estu facile skribeblaj pro la rapideco de la skribado; kaj ili estu reciproke nete diferencigeblaj pro la klareco de la skriba lingvo.”

Interesa estas ankaŭ la penso de Comenius, kiel esprimi ĉiujn ci-

<sup>6)</sup> *Sum* (lat.) = mi estas; *facio* = mi faras; *fio* = mi fariĝas.

ferojn per unusilabaj vortoj. La vokaloj estu rezervitaj al la ciferordoj kaj naŭ konsonantoj signas naŭ ciferojn. Tiel ekz. *i* signas la unuojn, *e* dekojn, *a* centojn ktp., *h* signifas 1, *ĥ* 2, *g* 3, *r* 6, ktp. Do la nombro 666 oni skribus kaj prononcus *ar-er-ir*.

**Silaboj.** „Unuaspecaj estos tiuj silaboj, per kiuj oni esprimas iun naturan bruon, ekz. *be* esprimas la beaĉon de la ŝafoj .....”

„Duaspecaj estos la silaboj, kiuj ekestas aŭ el la kunigo de la ecoj de la simplaj literoj, aplikataj je la aferoj (ekz. ĉar *k* signas ion malakran, *u* ion materian kaj nemoviĝeman, oni difinu al la silabo *ku*, ke ĝi signifu la teron, elementon maldelikatan kaj per si mem nemoviĝeman), aŭ laŭ la vicloko, kiun la literoj okupas en la alfabeto, en unu aŭ alia direkto. Tiel la unuaj du literoj povas signifi kaj sonesprimi komencon, la mezaj du mezon, la lastaj du finon, la unua kaj la lasta tuton .....” ktp.

**Vortoj.** Dum en la ordinara lingvoj la longo kutimas esti ĉefa akcidento de la vorto, en la nova lingvo neniu vorto havos en sia radiko longon. Ĉi tiun ĝi tamen alprenos, se oni volos signi la ripetadon de iu afero aŭ aktiveco. La longon Comenius signas per streketo super la vokalo. Ekz. *Io* — mi estas, *Ió* — mi kutimas esti, mi estas; *tar* — virbovo, *tár* — grego da virbovoj.

La genro estas nur unu — afereca, neŭtra. Se la afero dividiĝas laŭ sekso, tiam la vira genro retenas la aferecan finaĵon kaj al la ina genro estas almetata certa signo, ekz. *a* (*tar* — virbovo, *tara* — bovino).

**Pri la nomoj kaj pronomoj.** „Al la nomo apartenu sole la genro, diminutiviĝo, kazo kaj deklinacio.”

La diminutivon oni faras per la prefikso *bi* — t.e. malgranda; la grandigitan nomon per la prefikso *bu* — t.e. granda. Se do *hom* signifas homon, tiam *bihom* estas pigmeo kaj *buhom* giganto.

Sufiĉas sole kvin pronomoj. Du demandaj, unu pri persono, la alia pri afero: *Kiu?* *Kio?* Personaj pronomoj sufiĉas tri: *mi*, *vi* (sg), *li*. *Ni* kaj *vi* (pl) estas superflujaj. La pluralon ankaŭ ĉi tie oni distingigos per la finaĵo. Kiel la unua kaj dua personoj ankaŭ la tria persono estas komuna por ĉiuj tri genroj.

„Kazoj estu kvin (laŭ la nombro de la vokaloj), nominativo, genitivo, dativo, akuzativo kaj instrumentalo ..... Ilia finaĵo aŭ signo estu kvar vokaloj *i*, *e*, *a*, *o*.”

Se *El* signifas Dio, tiam oni ĝin deklinacias jene: *El* (dio), *Eli* (de dio), *Ele* (al dio), *Ela* (dion), *Elo* (per dio). En la pluralo *Elon*, *Eloni*, ktp.

Simile oni deklinacias la pronomojn: *O*, *E*, *I* — mi, vi, li; *ON*, *EN*, *IN* — ni, vi, ili. Ekz. *O* (mi) estas deklinaciata jene: *O*, *Oi*, *Oe*, *Oa*, *Oo*.

**Pri la adjektivoj.** Ne estas necese, ke la adjektivoj distingigu kaj laŭ la genro kaj laŭ la grado kaj laŭ la nombro, kaj ke ili estu eĉ dekl-

naciataj. Por tio sufiĉas nedeklinacieblaj partikuloj, same kiel al la verboj oni metas la adverbojn. Ankaŭ la numeraloj havos nek genron nek nombron.

„La ordinaraj komparativoj kaj superlativoj sole pligrandigas; kial ne aranĝi, ke ili ankaŭ malpligrandigu?”

Ekz. se *bon* signifas „bona”, tiam *mibon* estas „malpli bona” kaj *minibon* „malplej bona.”

**Pri la verboj.** Rilate la verbojn, estu nur unusola konjugacio kun unu modo, indikativo. Subjunktivo ne estas necesa.

„Infinitivo estu la nura radiko, havanta sendifinan signifon, t.e. samtempe prezencan, preteritan kaj futuran. Kaj kiel oni kuntiras vokativon kun nominativo, same oni kuntiros imperativon kun infinitivo, al kiu oni ĉi tie sole almetos kiel prefikson la personan pronomon *o, e, i, on, en, in*. Ekz.: Se *i* signifos esti, estos *oi* mi estu, *ei* (vi) estu, *ii* li estu; *oni* ni estu, *eni* (vi) estu, *ini* ili estu.”

Tempoj estas tri: prezenco, preterito kaj futuro, ĉe kio en la preterito kaj futuro estas du „modoj”, la nefinita kaj la finita.

Se la prezenco estas *io* — mi estas, tiam la preteriton nefinitan oni formas per la prefikso *h* — do *hio*, kaj la preteriton finitan per la prefikso *heh* — do *hehio*.

La fundamento, t.e. la radiko, de la verboj estu ĉiam unusilaba, konsistanta el tri literoj, nome el unu vokalo kaj du konsonantoj. La vokaloj A, E, I, O, U diferencigas la signifon de la subjekta (netransitiva) verbo disde la aktiva, pasiva, aktiva-aktiva kaj aktiva-pasiva. „..... Se *ban* signifas esti, tiam *ben* signifas igi (fari), ke io estu, pretigi, estigi, *bin* — esti farata, pretigata, estiĝi, *bon* — igi (fari), ke iu alia faru, pretigu, estigu, (estigiĝi), *bun* — igi (fari), ke io estiĝu, estu farata, pretigata (estiĝiĝi).”

Kiel dirite, la fundamento mem havas la signifon de la infinitivo kaj se oni almetas al ĝi la pronomon kiel *prefikson*, ekestas la imperativo. Almetinte la pronomon kiel *sufikson* oni ricevos la indikativon. La tempoj distingiĝas helpe de *sum, fui, ero* (lat. mi estas, mi estis, mi estos).

Ankaŭ estas eble distingigi la tempojn per la prefiksoj *F* por la futuro, *P* por la preterito, kun la vokalo de la koncerna verbo. La personoj distingiĝas sole laŭ la pronomoj *a, e, i* — mi, vi, li, kaj *á, é, í* — ni, vi, ili.

Se *ban* signifas esti, oni do ricevas jenan konjugacion:

Prezenco: *Bana, bane, bani, baná, bané, baní.*

Preterito: *Pabana, pabane* ktp.

Futuro: *Fabana, fabane* ktp.

Alia maniero por distingigi la tempojn estas ebla per la tempaj adverboj (kvazaŭ ekz. mi dirus: mi amas nun, mi amas antaŭe, mi amas poste).

**Pri la prepozicioj.** Laŭ Comenius sufiĉos por la nova lingvo dudek prepozicioj. Li opinias, ke la sama prepozicio povas tute bone esprimi „..... la movon al la objekto, la restadon en la objekto kaj la movon el la objekto, ligiĝante kun tri kazoj.” Sed estas eble solvi la aferon ankaŭ tiel, ke „..... la fundamento de la prepozicio (vokalo kun unusola konsonanto) signifas *la movon ien*; duobligo de la vokalo *la restadon en la loko*, kaj la inversigo de la fundamento *la movon de ie*.” Ekzemple *an* — en (urbon), *ana* — en (urbo), *na* — el (urbo).

„Ĉiu prepozicio (per si mem unusilaba) povas esti fekunda patrino de derivaĵoj, substantivoj, adjektivoj, verboj kaj adverboj.”

Se *a* signifas senigadon, *i* malpligrandigon, *u* pligrandigon, *e* partecon, *o* plenen, tiam tio havos egan avantaĝon por la lingvo. „Ĉar se *lus* signifas lumo, *alus* estos mallumo, *ilus* ombro, *ulus* granda lumo, *elus* iom da lumo, *olus* tuta lumo, t.e. hela brilego.”

**Pri la konjunkcioj.** Por la nova lingvo estos necesaj entute dudek konjunkcioj, kiuj tamen povos esti starigitaj nur, post kiam estos difinitaj la reciprokaj rilatoj de la aferoj. Konjunkcioj devas esti kreataj „..... kiel eble plej simplaj kaj plej konformaj al la aferoj, tiel ke el ili oni povu tuj krei eĉ substantivojn kaj adjektivojn, verbojn kaj adverbojn (kiel el la prepozicioj).”

**Pri la interjekcioj.** La interjekcioj estas gravaj en la nova lingvo pro tri kialoj:

1. Pro la koncizo — ofte ili anstataŭas tutan frazon;
2. pro la emfazo kaj ĉarmo, ĉar per ili oni povas esprimi la aferojn multe pli trafe; oni tion plej bone vidas en diversaj sentencoj kaj proverboj;
3. por ke oni povu el ili krei kiel eble plej abunde substantivojn kaj verbojn, adjektivojn kaj adverbojn, facile kaj efike signifivajn.

Interjekciojn oni kreu laŭ la sono, kiun oni rimarkas ĉie en la aferoj kaj en ties moviĝo.

„Aferoj malsimplaj aŭ kompleksaj estu esprimataj per vorto malsimpla kunmetita el tri simplaj; el kiuj unu signu la materion, la alia la kunigon kaj la tria la celon (eble). Tiam tia vorto estos vere kvazaŭ difino.”

**Pri la finaĵoj.** Ĉiuj finaĵoj devas esti plene signifoportaj kaj ne kiel estas en la ordinaraj lingvoj, kie ili per si mem havas kutime nenium sencon.

En la nova lingvo do validos du principoj:

- „1. Al ĉiuj literoj kaj silaboj oni atribuu taskojn, kion ĉiu el ili signifas ĉiam kaj ĉie, ajne, ĉu ĝi estas memstara aŭ aligita al alia vorto disvolvante ĝin. 2. Vortoj tiel disvolvataj estos ĉiuj vere kunmetitaj, montrantaj kunmetitajn ideon kaj aferon. Kaj tiel estos neniu vorto simple

derivitaj; sed kiu ajn vorto estos derivita, tiu estos jam per tio kunmetita.”

Comenius opinias, ke la nova lingvo havos eble nur 200 aŭ 300 radikojn, maksimume tiom, kiom da tagoj estas en la jaro. Ĉiuj havos sian devenon rekte eĉ la metafiziko, la restaĵo estos nenio alia krom kunmetaĵoj.

Comenius finas la gramatikon per la vortoj: „Ho, kiel granda semaĵo tio estos! Ĉar se el 24 literoj devenos tiom da plej precizaj vortoj, kiel el ducent silaboj, signantaj la elementojn de la aferoj, ne devenus miloble mil plej karakterizaj vortoj kaj plej kernecaj parolturnoj?”

3. La **tria parto**, kiu pritraktas aŭ devus pritrakti la kreadon de la terminaro de la aferoj, estas nefinita kaj entenas nur kelke da frazoj. Comenius diras ĉi tie, ke „..... la nova terminaro de la aferoj plej bone estiĝos sub gvido de la „*Pordo de la aferoj*” (*Janua rerum*<sup>7)</sup>). Ĉar la aferoj de la sama genro estas tie pritraktataj kune, oni tiel povos facile eltrovi, kiamaniere kiel eble plej simple esprimi la genron, kaj kiel helpe de trafaj distingigaj signoj plej konvene dismembrigi la saman genron en specojn.”

„La plej altaj kategorioj de la aferoj (el kiuj ĉio devas kunmetiĝi) estu markitaj per certaj sonsignoj, kaj poste estos facila afero kunmeti vortojn same kiel estas kunmetitaj la aferoj.”

#### IV. Fermo

La *Panglotio* de Comenius estas verko nefinita kaj sekve en multaj lokoj suferas pro nesufiĉa tralaboriteco, kiel oni povas konstati jam el multaj eksterajoj. Ekzemple ne ĉiujn ĉapitrojn Comenius dividas en paragrafojn, kiel estis lia kutimo, kaj en la verkoj mankas ankaŭ la margenaj rimarkoj, kiujn oni renkontas en aliaj verkoj de Comenius.

Comenius neniel ankaŭ havis la intencon krei plenan sistemon de nova lingvo, ĉar laŭ li tio estos ebla nur post finkonstruo de la pansofio; tial ĉiuj liaj pensoj prezentataj en tiu lia verko estas komprenendaj pli kiel ekzemploj. Fine, kiel la leganto de la *Panglotio* mem povas konvinkiĝi, li prezentas kelkfoje eĉ plurajn malsamajn ekzemplojn kaj tiel liaj pensoj ne unufoje sur diversaj paĝoj eĉ kontraŭstaras reciproke al si.

La universala lingvo de Comenius simile kiel lia pansofio estas komprenenda kiel utopio kaj Comenius mem prokrastis la proponatan lingvon al estonteco. En la *Panglotio* de Comenius kiel ankaŭ en la almetita aldono „*Unua provo pri nova harmonia lingvo*” la teoriaj pensoj superpezas la praktikan vidpunkton. Estas tamen granda damaĝo, ke la *Panglotio* de Comenius restis dum tri jarcentoj perdita kaj nekonata, ĉar per tiu verko Comenius starigis al si daŭran monumenton en la historio de artefarita lingvo.

<sup>7)</sup> metafizika kaj ontologia verko de Comenius.

## ATAKOJ KONTRAŬ GARDENPLANTOJ de D-ro Paul NEERGAARD

licenciato de hortikulturo, magistro kaj doktoro de agronomio kaj sekciestro ĉe Ŝtata Plantpatologia Servo, Kopenhago, krome membro de la Akademio de Esperanto

*La unua libro aperinta en Esperanto:*

*pri GARDENKULTURO,* *pri PLANTMALSANOJ,*  
*pri INSEKTOJ,* *pri DAMAĜAJ FUNGOJ.*

La libro enhavas 234 paĝojn artpaperajn, kiuj enhavas 75 tekstfigurojn. Krome, la libro enhavas 9 kolortabulojn, kiuj sume enhavas 85 figurojn, do la libro entute enhavas 160 bildojn!

Belege tuttote bindita, kun ora stampo kaj kolorpresita kovrilo, desegnitaj de la dana pentristo Mogens Zieler.

Prezo £ 1, afranko 9p.

Eldonita de  
THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LTD, ANGLUJO

Mendebila ĉe  
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO,  
Eendrachtsweg 7, Rotterdam, Nederlando,  
aŭ ĉe landaj kaj lokaj Libro-Servoj,

Profesoro ĉe la Agrikultura Kolegio de Okcident-Skotlando, D-ro  
HUGH NICOL, Ph.D., F.R.I.C., F.R.S.E., en *Esperanto*:

Mi ne konas libron verkitan anglalingve kiu valoras siaspece la duonon de “Atakoj kontraŭ ĝardenplantoj” ..... La libro estas perfekta kiel presajo, ĝia lingvo estas senerara. Ĝuebla de ĉiu — fakisto aŭ ne.

Cefĝardenisto ĉe la Ŝtata Ĝardeneksperimentejo en Alnarp, Svedujo, S-ro CARL A. KLANG en *Svenska Esperanto-Tidningen*:

Tre malofte oni vidas tiel modernan, aktualan, belpresitan kaj seneraran faklibron ..... Pri la enhavo mi konstatis, ke ĝi estas pli moderna kaj aktuala ol svedaj ĝardenlibroj, kiuj ĝis nun aperis.